

Numero: 263.  
Aprilo: 2014.

22-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefona: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# Aprila rideto

Longiĝis la tagoj kaj sunradioj varmete karesadas nian vizaĝon. Alvenis aprilo, la gaja monato kun sia ĉarmo kaj bonhumoro. Ĉio ridetas kaj salutas nin. Ni feliĉe iras en la naturon kaj volus ĉirkaŭbrakumi ĉiun arbon kaj arbuston. Fine forpasis la frosta vintro, degelis neĝo kaj glacio. Sur la branĉoj de la arboj triladantaj etaj birdoj ĉarmas nian animon.

Sur la terglobo ne ekzistas homo, kiu ne ŝatus la printempon. Ĉi sezone ĉio renoviĝas, renaskiĝas. Ankaŭ ni. En nia koro novaj planoj kaj espero vekigigas, kaj ni kun grandaj decidoj revadas pri la estonto.

Ĉu ankaŭ en via koro naskiĝis novaj esperoj, kiuj direktas vian vivon? – Certe. En aprilo, en tiu ĉi belega monato ĉiu revadas. Kial vi estus alia? Ankaŭ vin tuŝis ĉi tiu grandioza sento, kaj ĝoje vi akceptas kison de aprilo.

La homoj ŝatas aprilon kaj ĉiu ĝojegas, kiam venteto ekkaresas sian vangon.

Vintre kiomfoje oni sonĝas pri tiu ĉi monato. Dum longaj frostaj vesperoj sidante apud la kahelforno oni revadas pri tiuj ĉi karegaj momentoj.

Ankaŭ ni salutu aprilon kun rideto kaj kanto! Eĥu la ĝojkrio de turistoj kaj naturamantoj. Vagante tra arbaroj kaj kamparoj oni sentas eksterordinaran atmosferon. La okuloj ekbrilas vidante etajn birdojn en la blua ĉielo.

Tiu ĉi printempa renaskiĝo sugestis al ni, ke en la mondo ekzistas lingvo, kiu bezonas nian entuziasmon. Se Suno brilas kaj alloga estas la naturo, ni ne forgesiĝu pri Esperanto. Ankaŭ la arbaroj kaj kamparoj estas verdaj. Ĉi verda koloro donas por ni esperon. En iu tago la tuta terglobo verdiĝos kaj por ĉiam malaperos la lingvaj miskomprenoj. La homaro havos komunan lingvon per kiu ni povos egalrajte komuniki unu kun la alia.

Ĝis tiam kiom da printempoj oni devos travivi. Bedaŭrinde mi ne scias la respondon. Mi nur esperas, tiu ĉi tago jam estas proksime.

-Redaktanto-

# Lingva malfacilaĵo

Antaŭ ol komenci ĉi rakonton mi prezentas la rolantojn. En la parko sur benko sidas viro kaj virino. Ili ambaŭ parolas malsaman lingvon. La virino venis el Usono, la viro el Rusio. La virino nomiĝas Mary, la viro Igor.

Do komenciĝu la rakonto!

La ruso deziris ekkoni la sidantaron. Unue li ĵetis kelke da tentaj rigardoj al la virino kiu simpatiis je li.

Estis grava problemo. Ili ne povis komuniki, ĉar ili ne havis komunan lingvon. Vane estis la rusa kaj la angla mondlingvoj, sed ili parolis nur sian propran.

Kion fari en tia ĝena situacio?

Por ili restis nur la montrado mane kaj piede. Sed kiu komencu? Tio estis la grava demando.

Unue la viro mute rigardis la usoninon kaj post iom da hezitado li eklevis sian dekstran manon kaj li signis per ĝi.

Mary interesiĝante rigardis la rusan. En ŝiaj okuloj vidiĝis, ke ŝi komprenas nenion. Ankaŭ ŝi signis per siaj manoj. Ŝi mire disetendis siajn brakojn.

Poste sekvis silento. Nenio okazis. Ili nur rigardis mute unu la alian.

La viro provadis per sia gepatra lingvo. Kompreneble tion la virino ne povis traduki. Ŝi ne parolis la rusan lingvon.

Denove pasis longa paŭzo. La usonanino iom kolere rigardis al li, kvazaŭ ŝiaj okuloj dirintus: „Kial vi ne parolas mian lingvon? La anglan. Jam la tuta terglobo parolas ĝin. Honte, ke vi ne ellernis mian lingvon.”

La viro malĝoje sidis sur la benko. Eble li ĝuste ĉagrenis, ke ŝia kunulino ne parolas ruse. Kiom pli facila estus la mondo, se ne estus lingvaj malfacilaĵoj. Ĉu ankaŭ aliaj homoj travivis tiun ĉi ĝenan situacion? Li estas belega virino kaj anstataŭ amoro ili nur gapas unu al la alia. Ili ankoraŭ ne povis atingi ĝis la kisumado. Se inter ili ne estus lingva muro, tiam ili jam estus en la ĉielo – pensis la viro kaj ekstaris. Ankaŭ la virino kaj ili ekiris unu dekstren la alia maldekstren.

-Ŝaŝa-



# Milito

Dum longaj jaroj ili estis sinceraj amikoj. Ĉiutage ili renkontiĝis, eĉ ofte ili sidadis kune antaŭ la domo sur benko. Inter ili estis ĉiela paco.

Neniu scias, kiel kaj kial erupciis la milito. Ankoraŭ vespere ili disiĝis en granda amo kaj ili diris unu al la alia, ke morgaŭ ili denove renkontiĝos kaj babilados plu.

Sed matene jam kolektiĝis nigraj nubegoj sur la firmamento de ilia amikeco.

Komence ili ne volis kredi, ke ilia bona rilato malboniĝis. Ili pensis, ke tio ĉi estas nur malbona sonĝo kaj baldaŭ ili vekigis. Ili esperis, ĉio estos la malnova kaj, ili denove sidos antaŭ la domo sur la benko.



Bedaŭrinde, ne tiel okazis. De tempo al tempo la situacio iĝis pli kriza. Du amikoj ne deziras vidi unu la alian. Surstrate, se ili iris, tiam ili estis tre atentemaj, por ke ili ne devu renkontiĝi.

Hejme se familianoj demandis kio okazis, ili ne respondis, nur mute rigardis al la demandanto. Sed en iliaj okuloj vidiĝis, la problemo estas granda, eĉ la plej eta espero de la repaciĝo ne estis sentebla.

-Ja, vi estis sinceraj amikoj – diris najbaro – kial vi koleras.

-Mi ne scias. Eble la kolero kaŝiĝas en la aero. La mondo estas venenigita. La kolero ŝvebas ĉie inter la domoj, arboj kaj sur kamparoj. De ĝi ne eblas rifuĝi. Estas milito, kio baldaŭe infektos la tutan terglobon. Ĉu vi ankoraŭ ne sentas tiun ĉi spiron de la fantomo de la estonta terura milito? La mondo pereigos, kaj Tero post kelkaj tagoj, aŭ semajnoj estos nur senviva dezerto. Ĉio, kio estis bela kaj bona, ne ekzistos plu. Vi ne povos forkuri. La kolero ĉie atingos vin. Vane vi serĉas la insulon de la paco. Tio jam ne ekzistas. Ankoraŭ ĝin bruligis la kolero, kio ekiras konkeri la tutan universon.

Ne diru, ke vi haltigos la koleron. Tio ne eblas. La mondo jam estas la ĝia. Ĉion ĝi akiris kaj la milito disvastiĝas.

Provu akcepti tiun ĉi malgajan fakton, ke terglobo pereigos por ĉiam. Vana estas ĉiu provado. Ankoraŭ via kredo ne helpas, kaj ne povas savi la homaron.

Dio?! Ne ridigu min! Ankoraŭ Dio estas senkonsila pro la homa stulteco. Ili povus vivi en eterna amo kaj

kompreno. Sed la amikoj preferas la koleron. Ekscite serĉi en alia homo la malbonon kaj malforton.

Akceptu vian sorton! Ne protestu kontraŭ tio. En iu tago ankoraŭ en vian koron ennestiĝos la kolero kaj vi vivos la baldaŭan militon. Vi faros nenion por ke ĉi milito ne okazu. Ne diru al mi, iam ni sidis antaŭ la domo sur benko, kiel du bonaj amikoj. Tiu epoko forpasis. Vi restis sola en tiu ĉi giganta kirliĝanta fimsaĉo kaj petegas la rapidan, facilan morton.



Eble vi pensas, ke vi povos liberiĝi de la milito per morto.

Ne pensu tion! Ankoraŭ en la ĉielo la anĝeloj militas. De milito oni ne povas liberiĝi. Ĝi jam superis la pacon. Sekrete ĉiu deziras la militon, kies fajro estas la kolero. Koleri kontraŭ ĉiu homo, disrompi malnovajn amikecojn.

Baldaŭe alvenos tempo, kiam ekzistos nur du vortoj: KOLERO kaj MILITO. Ili estas, kiel du bonaj fratoj. Ili estos viaj novaj familianoj.

Forbruligi la tutan mondon! Tio ĉi estu via nova slogano!

**KOLERO kaj MILITO!**

Forgesu la benkon antaŭ la domo kaj tiujn animagordajn babiladojn.

KOLERO kaj MILITO kovros ĉion kaj liberiĝi ne eblas.

-Apáti Kovács Béla-



# Poezio

## Al la «Esperantisto»

En bona hor'! Ni aŭdis la  
signalon  
kaj bataleme saltas nia koro.  
Konduku nin, komencu la batalon  
sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,  
salutas vin, ho nia luma stelo!  
Konduku nin, senhalte kaj sentime,  
al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estas nia vojo  
kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;  
sed batalante, kun plej granda ĝojo  
senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,  
l' unua muro estas trarompita,  
kaj dolĉa estos nia rekompenco,  
kiam la celo estos alvenita.

L. L. Zamenhof



## Ho, mia kor'

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
el mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
ho, mia kor'!

Ho, mia kor'! Post longa laborado  
ĉu mi ne venkos en decida hor'?  
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
ho, mia kor'!

L. L. Zamenhof



# Poezio

## Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas  
senĉese, senfine, senhalte,  
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'  
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo  
murmurado penetras mistera,  
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,  
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas  
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...  
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,  
en mi batas konfuzo la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,  
rememore en mi reviviĝis,  
aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos  
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,  
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;  
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,  
al la freŝo la koro min tiras.

L. L. Zamenhof





# Por infanoj



## Avoĉjo kaj Peĉjo

Post la longa, frosta vintro, kiam la granda neĝo degelis ankaŭ en la ĝardeno, kaj la birdetoj ektrilis sur la branĉoj de la arboj, avoĉjo invitis Peĉjon en la ĝardenon.

-Kara nepeto mia, ni iru en la ĝardenon!

La knabeto feliĉe sekvis la maljunulon.

-Kion ni faros en la ĝardeno? – li demandis scivole.

-Ni rigardos la arbojn kaj arbustojn. Ni aŭskultos la pepadon de la birdoj. Estas bela, varma vetero. Agrable iom pasigi tempon en la printempa ĝardeno.

La ĝardeno estis malantaŭ la domo. Ili ne devis longe iri. Baldaŭ ili alvenis. La avoĉjo malfermis la pordeton de la ĝardeno, kion ankoraŭ aŭtune li bone ŝlosis.



La knabeto, kiel ĉevalido enkuris kaj komencis kuradi. Kiam li laciĝis, rekuris al sia avoĉjo kaj demandis:

-Avoĉjo, kie estas la birdoj? Mi ne vidas ilin. Vintre vi diris, se ni donas al ili birdonutraĵon, tiam ili reciprokos nian bonecon. Vi ankoraŭ faris por ili ankaŭ birdonutrejaĵon. Ĉu ili forgesis, ke dum la frostaj, neĝaj monatoj ni helpis ilin?

La maljunulo ekridetis kaj karesis la kapon de la knabeto:

-Ne, ili ne forgesiĝis pri ni. Ili restis tie ĉi, sed kaŝiĝis inter la arbobranĉoj. Se ni restos silentaj, tiam baldaŭ ni ekaŭdos, eĉ eble ni ekvidos ilin. Ni sidiĝu sur ĉi tiun benkon kaj atendu trankvile!

Ili sidiĝis sur la benkon proksime al iu maljuna pomarbo. Por Peĉjo estis tre malfacile resti silenta,

sed nun tamen li ne bruidis, ĉar li deziris ekvidi kaj ekaŭdi la pepadon de la birdoj.

Pasis longaj minutoj, sed krom la surstrataj bruoj ili aŭdis nenion. Peĉjo flustris malgaje al la avoĉjo:

-Avoĉjo, neniuj birdeto estas en la ĝardeno. Certe ili forflugis kaj ĝis vintro ili jam ne revos. Mi koleras pri tiuj ĉi birdoj. Ili estas sendankaj. Dum la tuta vintro vi nutris ilin kaj kiam alvenis la bona vetero, ili forflugis al la arbaroj. En la sekva vintro ni ne donu al ili grajnoj. Ili serĉu nutraĵon en la arbaro, kie ili nun estas.



-Ho, nepeto mia, ne estu maljusta! Atendu ankoraŭ iomete! Baldaŭ vi ekaŭdos ilin.

Peĉjo kredis kaj ne kredis, kion la avoĉjo diris al li. Indiferente li sidadis sur la benko kaj atentis.

Denove pasis longaj minutoj. La sunradioj milde karesadis lian vizaĝon. Estis bone ĝui la unuajn varmajn, printempajn tagojn.

Lia avoĉjo sidis trankvile kaj atendis. Nun li ne pipfumis, kvankam alifoje ĉiam pipo estis en lia buŝo.

Kiel ili sidadis tie, subite super ili inter la branĉoj malgranda birdo komencis triladi. Tiom belege, ke ankaŭ la unuaj printempaj floroj ekridetis.

Peĉjo feliĉe ekkriis:

-Avoĉjo, ĉu vi aŭdas? Birdeto kantas. Vi pravus, ili ne forlasis nin. Ili restis en la ĝardeno. Bone, ke ni donis nutraĵon al ili. Nun ili dankas nian helpon, kial dum la frostaj vintraj tagoj ni ne lasis ilin malsatmorti.

La maljunulo konsentis kun sia nepeto. Ili ankoraŭ iomete aŭskultis la triladon de la birdo kaj fine li diris:

-Kara mia, ni iru en la domon! Certe jam via avinjo kuiris la tagmanĝon.

La avo serĉis la pipon en sia poŝo kaj kontente li ekiris kun sia nepeto Peĉjo al la domo, de kie jam estis sentebla la bonodoro de la tagmanĝo.

-La onklo Adalberto-



# Budapeŝtaj bildoj

# Budapeŝtaj bildoj

